



BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



55-a jaro - n° 1  
Januaro - Februaro 1963



Demandu provveturon per  
la nova

# Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por BRUGGE kaj  
ĉirkaŭaĵoj

## GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.


REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE  
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE tel. (050) 319.81  
MAERTENS GRÉGOIRE  
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL  
BRUNO DENOËL  
ISERENTANT ROGER  
DE CUYPER GEORGES  
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO :

TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK tel. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD  
JAUMOTTE MAURICE

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN tel. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS tel. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINOJ

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT  
PORKONGRESA : PLYSON J. 23, PLACO E. FLAGAY, BRUSELO 5 P.K. 236804

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2  
P.K. 9051.25

POŝTKONTO DE B.E.F. :

1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT



Internacia konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, Beograd-Jugoslavio, 28.VII - 1.VIII 1963.j.

Diskutbranĉoj : Instruado — Praktika aplikado de Esperanto — Kontribuo de E. Al internacia kompreniĝo — Organiza laboro.

27.VII.1963 (sabato) La alveno de partoprenontoj.

Malfermo de la ekspozicio « Esperanto en la servo de edukado ».

28.VII.1963 (dimanĉo) Solena malfermo de la Konferenco.

Enkondukita referaĵo : « **Kontribuo de Esperanto al la Internacia kompreniĝo kaj realigo de UNESKO-Celoj** » (K-do Petar Vukomanovic, Jugoslavio)

Diskuto pri la temo : « **Kontribuo de Esperanto al la ĝeneralaj edukado kaj instruado** »

29.VII.1963 (lundo) Diskuto pri la temo : « **Ĝisnunaj organizaj Spertoj rilate al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn** »

30.VII.1963 (mardo) Diskuto pri la temo : « **Plibonigo kaj modernigo de E-instruado kaj fakaj klopodoj tiurilate** »

31.VII.1963 (merkredo) Diskuto pri la temo : « **Liberaj aktivecoj de gelernantoj lernantaj Esperanton** »

Modela internacia instruhoro.

1.VIII.1963 (ĵaŭdo) Diskuto pri la temo : « **Aktualaj organizaj problemoj** »

**Oficialaj konkludoj, decidoj kaj resolucioj.**

Kulturarta vespero en Esperanto. Partoprenos : Teatra grupo el Zegreb, Junularo E-kantkoruso el Ljubljana kaj aliaj.

**INFANA RENKONTIGO « INFANOJ NE KONAS LA LIMOJN »** Partoprenos la infanoj en du grupoj: inter 10-14 jaroj kaj inter 14-18 jaroj. Pri la infanoj zorgos konataj spertuloj kaj profesiaj edukistoj.

**Laborenhavo:** Komunaj ludoj, promenoj. Farado de murgazetoj, « Grajnoj en vento ». Rekontiĝo kaj konkursoj kun beogradaj infanoj. Recitado, kantado, teatraĵetoj. Reciproka interŝanĝo de donacetoj. Amuza orientiĝo en la naturo per kompasoj. Vizito al infanaj urbeto kaj aŭtodromo. **MODELA INTERNACIA INSTRUOHORO.**

**E-EKSPOZICIO « ESPERANTO EN LA SERVO DE EDUKADO »** Ĉiu lernejo kaj instruisto estas petata kontribui al la sukceso de la ekspozicio per iom el la jena materialo:

1) Belaj poŝtkartoj pri via urbo, lando ktp. Infanaj desegnaĵoj. Lernejoj aŭ hejmaj skribtaskoj en gepatra lingvo. Infanaj manlaboraĵoj faritaj dum la lernejoj instruoj. Diversaj bildetoj kiun infanoj kutime reciproke interŝanĝas dum paŭzoj (de ĉokoladoj, alumetikedoj, fotetoj de aktoroj, piedpilkludantoj, diversaj bestoj ktp.) Lerneja aŭ klasa infana gazeto. Diafilmo pri via urbo, lando a. s. Unua ABC-libro por infanoj de elementaj lernejoj. Unua lernolibro por ekoni la naturon. Porinfanaj plej ŝatataj gazetoj (nacilingvaj) de via lando. Nacia flageto. Alia materialo konvena laŭ via bontrovo.

2) Lernolibroj por Esperanto. E-vortaroj kaj terminaroj. E-gazetoj por infanoj kaj junularo. E-literaturo por infanoj. Magnetofona bendo (« sona letero ») kun E-kantoj, deklamoj, salutvortoj de gelernantoj ktp. ktp. Bele kaj akurate skribitaj E-leteroj de gelernantoj, ktp.

## Ĉu la Poezio de William Auld estas arto ?

Drs. F. ROOSE.

En la Germana Esperanto-Revue (junio 1962 ; p. 67-68), sub la titolo « Tri fenomenoj : Esperanto - Arto - Auld » aperis serioza studartikolo de Uwe Joachim Moritz pri tiu temo. La verkinto estas studento pri filologio. Do, kiel filologo, li certe kontaktis jam ofte tre variajn artaĵojn. Tamen estas akcentende ke filologio kaj arto estas du malsamaj terenoj. La artikolo kondamnas nepre kaj definitive la arton de Auld. Pro, ĉefe, tri motivoj : 1) la troa abundo de neologismoj ; 2) la ŝoke akcentita atentigado pri seksaj ekscitoj kaj impulsoj, kio finfine iĝas pornografio ; 3) kripligo de la lingvo per apostrofado.

Rilate al la unua plendo, la aŭtoro starigas Auld antaŭ interesa, bone trovita dilemo (aŭ unu aŭ la alia!) : aŭ vi uzas neologismojn nenecese, kaj tio pruvas ke vi ne estas artisto ; aŭ vi uzas ilin pro neceseco, kaj tiam tio pruvas la ne-taŭgecon de esperanto(!) (dum ke W. Auld ĉiam proklamis la plenvalorecon aŭ eĉ supervaloron de esperanto).

Ni mem jam plurajn fojojn atentigis pri la tro multaj neologismoj, kaj ni akcentis ke jen kuŝas vasta kaj urĝa laboro por la Akademio kiu devus esti kompetenta kaj kapabla por preni decidojn en tiu afero. Aliflanke la problemoj ne estas simpla ;

kaj ni rekonsilas la legadon de la koncerna ĉapitro en « Lingvo kaj Vivo » de Prof. Dr. G. Waringhien kaj ankaŭ en la ĵus aperinta « Planlingvaj Problemoj » de William Gilbert. (Ambaŭ eldonoj de « Stafeto »).

Rilate punkton tri, ankaŭ ni jam plurfoje esprimis nian malŝaton de la troa apostrofado kaj ni laŭdis la bedaŭratan Brendon Clark, recenzante lian libron « Kien la Poezio » (eld. E-o. Publishing Cy.)

Sed rilate punkton du, ni rediras kion ni diris en la recenzo pri « Unufingraj Melodioj » en « Flandra Esperantisto » : Ni konsideras W. Auld tre granda poeto. Ni klopodos pravigi nian juĝon. Ni konsentas ke (multaj?) poemoj de W.A. estas preskaŭ senvaloraj. Li estas modernisto ; kaj multaj tiaj provas « novajn formojn ». Mi ne scias en kiu grado W.A. estas ankoraŭ en la prova stadio, sed multaj de liaj poemoj impresas kvazaŭ provoj. Kaj kiel tiaj ili baldaŭ estos forgesitaj. Aliaj estas eĉ iom banalaj. Sed mi kredas ke li verkis kelkajn kiuj atestas pri tre granda artisto. Se fari komparon. Ankaŭ nia Bruĝa pastro-poeto Guido Gezelle estas konsiderata kiel poezia grandulo. Kaŭze de kiom da poemoj ? Kiam mi tra legis ilin, mi estis daŭre seniluziigata... ĝis, subite, inter la granda amaso da laŭcirconstancaj banalaj rimaĵoj mi malkovris unu veran perlon de poezio. (« Ego Flos » ekzemple. Nia talenta



Antverpenano H. Vermuyten tradukis kelkajn sub la titolo « Se aŭskultas la Animo »).

Multe pli grava estas la akuzo de Uwe Joachim Moritz laŭ kiu la arto de W.A. — se almenaŭ mi rajtas uzi tiun kvalifikon — estas pornografio. Povas esti ke kelkloke ĝi estas tia. Mi havas la saman impreson. Tamen ni estu prudentaj. Ankoraŭ jardekojn post la apero de la « Floroj de l' Malbono » de Ch. Baudelaire, tiu poemaro estis konsiderata kiel nura pornografio. Kaj hodiaŭ? Mi kredas ke la nunaj prijuĝoj estas multe pli nuancaj. Koncerne la artan karakteron, mi kredas ke ne plu estas multaj kritikantoj kiuj kontraŭdiros tion. Estas evidenta ke tiaj poemaroj estas destinitaj nur al formita publiko, kaj ne al kiu ajn! Por nekulturitaj personoj la supra verko povas efiki nur kiel pornografio. Tio estas evidenta.

Preterpase mi devas ankaŭ diri ke tio kio laŭ U.J.M. estas pornografio, (« Poemo estas koito ») eble povas esti fakto malkovrita sur la tereno de la psikologio.

U.J.M. sopiras al pozitiva arto, t.e. kiu « celas ion, ion bonan, ĝojigan, helpan, celas konsili kaj konsoli, admoni kaj glorigi, meti atingindan celon ». Ankaŭ ni havas saman sopiron. Sed ĉu la kruela, kruta, nevualita elmonro de la malbono, se oni ne glorigas aŭ pravigas ĝin, ne havas bonan efikon? Oni ja tiam naŭzas de tia vivo kaj de tiaj situacioj. Kaj tiurilate U.J.M. elektis tre maltaŭgan ekzemplon por kondamni la arton de W.A.: « Ebrio » (« Esperanta Antologio » p. 414-415). Ĉu li ne

legis ĝis la fino? ĝis la « naŭzo »? Cetere en ankoraŭ aliaj punktoj tiu poemo kontraŭargumentas la tezon de U.J.M. Tie kie li prave diras ke formo kaj enhavo devas harmonii, ĉu la 18 unuaj linioj de tiu poemo ne estas ĉarma kaj originala pentraĵo kie formo kaj enhavo harmonias? U.J.M. prenas version el ĝi « ŝuvi puvi — povi povas » kaj demandas tiam ĉu primitiva imitado de ebriulo estas arto? Mi respondas: ĉu pentristo rajtas pentri ebriulon? Se jes, kia li devas montri lin? Nu, tiu parto de la poemo « Ebrio » estas vorta pentraĵo. Kiam U.J.M. skribas ke artverko « devas iel voki nin, ĉu milde demandi, ĉu akre insulti... ĝi devas kapabli en ni reeĥi » (tute prave kaj trafe!) tiam mi konsilas al li relegi « Unu el ni » (« Unufingraj Melodioj » p. 49). Kia akra insulto al ni... kiuj espereble ne ankoraŭ estas tiaj, sed kiuj povus iĝi tiaj se ni ne formus nin mem; kaj kia admono!

Mi ŝatus scii kion U.J.M. pensas pri la poemo « Noktaj Pensoj » (« Unufingraj Melodioj » p. 46). Je unua legado mi estis mirigita kaj mutigita. Je dua legado tre malrapida, ĝi « ion diris » al mi. Poste venis antaŭ miaj okuloj pentraĵoj de surrealistoj.

Je la fino de sia artikolo U.J.M. demandas: « Ĉu li fakte ne kapablas ion esence gravan, proflunde veran diri al ni? Ĉu li do havas neniun komision paroli al ni? » Efektive tion oni povas demandi kaj eĉ postuli de ĉiu vera artisto. Mi konstatas ke pri arto mi havas absolute la samajn ideojn kaj kon-

ceptojn kiel U.J.M. Sed mi kredas ke W. Auld plenumas la kondiĉojn dum ke U.J.M. opinias ke li ne plenumas ilin. Nia germana samideano prenis ekzemplon el « La Infana Raso » (eldono de Stafeto). Por kompreni Auld entute kaj « La Infana Raso » speciale, estas, laŭ mi, necese legi la kritikon de Prof. Waringhien en « La Nica Literatura Revuo » Jan. - Feb. 1957 p. 116. S-ano Moritz eble prenis efektive malsukcesintan ekzemplon. Mi povus kontraŭmeti aliajn.

Artisto ja pli profunde sentas kaj vidas ol alia homo. Li pri-skribas la kernproblemon de sia tempo aŭ medio. Aŭ li montras la esencajn trajtojn de ili. Li portas mesaĝon kiu lumas tiomdiversfoje kaj diferenmaniere en siaj verkoj. Kio de ĉio tio-ĉi ĉe Auld?

Estas eble ankoraŭ tro frue por respondi al tiu demando. Kio estas fakte la esence grava trajto de nia homaro?, de nia tempo? Aŭ la ĉefa bezono? do la kernproblemo? Eble tio ne ankoraŭ estas perceptebla? En rilato kun la arto(?) kaj kun la voko de W.A. al la homoj, ŝajnas al mi ke li volas montri ke la homaro estas ankoraŭ kiel infano, se oni rigardas al ĝiaj faroj kaj moroj; ke montriĝas evoluo kiu daŭras kaj ankoraŭ daŭros tre tre longan tempon, kaj kiu kvazaŭ nur komenciĝis; ke en la cerboj de la homoj oni ankoraŭ vidas nur erojn de tiu racio kiu fine devos gvidi tiujn homojn por ke estiĝu feliĉiga, enorda, paca vivo. Kaj ŝajnas al mi ke tiun malraciecon li volas precipe montri en du aferoj: la sekseco kaj la religio.

Tie-ĉi mi havas ankaŭ la impreson ke li eraras. Mi ne vidas kiun precizan celon li volas atingi rilate la seksojn. Sed ni devas pravigi lin se li trafe atentigas pri la grandega rolo kaj valoro de la seksa vivo; pri la multegaj falsaj konceptoj tiurilate; pri la ofte nur imagita malmoraleco aŭ pri malbonvola hipokrita kulpigo de malmoraleco; fine pri la fakto ke sekseco estas centpocente natura afero. Eble li foje troigas, foriras el la vojo, senbridas. Tie troviĝos tiam makuloj en la verkaro kaj tio fine malgrandigos lin.

Multe pli eksplicita li estas kiam li atakas la religion. Ankaŭ sur tiu tereno troviĝas multegaj miskomprenoj, miskondutoj, infanaĵoj, skandalajoj eĉ. Gratulon al li se li povas tiel klare montri tion ke li tiamaniere helpas al la forigo de ili. Sed se li volas mortigi Dion aŭ helpi al Lia mortigo (« La raso estas juna: ĝi konstruos teran ĉielon — post la mort' de Dio! »), tiam mi ridetas... kaj kompatas lin.

Sed ankaŭ en la fina malsukceso kaj eĉ drameca pereco, iu povas esti granda. Tiel li staras antaŭ ni, tiu William Auld, kun lia propra vizio pri esperanto kaj la esperantismo. Signo de kontraŭeco por multaj inter ni. Tre granda virtuozo de nia lingvo (vidu ĉapitron IV el « La Infana Raso »), sed ne nur virtuozo. Lia poezio certe ne estas facila. Oni povas malkonsenti kun liaj ideoj kaj tendenco. Mi kredas ke ideologie W.A. estas la kontraŭo de mi. Sed oni ne povas nei la artan kvaliton de multaj inter liaj poemoj.



# FEDERACIAJ SCIIGOJ

## GENERALA JARKUNSIDO

La unua jara ĝenerala kunsido de B.E.F. okazos en la salono de « Monico Nord », Brabantstrato, 2, Bruselo, SABATON, LA 2an DE MARTO, JE LA 15,30a HORO.

Niaj membroj tiam aŭdos la raportojn pri la unua laborjaro, post kio okazos la elekto de la administrantaro, kiu devos elekti la unuan definitivan estraron de nia Federacio.

Antaŭ tiu kunsido, je la 14,30a h., kunvenos la administrantaro, kiu cetere daŭrigos sian laboron tuj post la ĝenerala jarkunveno.

## La gvidado de nia revuo

Dum sia lasta kunsido, la administrantaro de B.E.F. decidis ke, — dum S-ro M. Jaumotte kompreneble kiel prezidanto konservas la ĉefrespondecon pri la eldono de nia revuo, — ties aperigo tamen estos prizorgata, ekde januaro 1963a, de Bruĝa trio, sub prezido de S-ro Fernand Roose, kiu estos helpata de S-roj Grégoire Maertens kaj Charles Poupeye.

Ekde nun do, ĉiu teksto por la revuo estas sendota al la adreso de S-ro Roose: Ste. Klaradreef, 59 Brugge; kaj **neniuo-kaze** al la prezidanto, kiu faras varman alvokon por ke la tekstoj enpresigitaj estu sendataj, ne en formo de letero, el kiu la redaktoroj devas « elsuĉi » la presigitan tekston, aŭ almenaŭ kopii ĝin; sed ke la ensendonto verku ĝin en formo, kiu ŝajnu al li ne enpresigota sed ja enpresigebla!

## La Jubilea Beneluksa Kongreso

Multaj el niaj membroj jam aliĝis al nia Jubilea Beneluksa Kongreso, kiu okazos en Antverpeno dum la proksimaj pentekostaj tagoj. Multaj aliaj tamen jam ne faris.... **Ili do faru tuj!**

En la decembra numero de « Sonorilo » estis enpinglita « aliĝilo ». La L.K.K. senpacience atendas la ensendon de tiu aliĝilo.... Ĝi efektive nenion seriozan povas entrepreni antaŭ ol ĝi scias **proksimume** kiom da festenontoj estos kaj kiom da ekskursontoj.

Ne prokrastu do: **sendu la aliĝilon; pagu la ŝulditan monon.**

**Kaj tiuj, kiuj ne ja pagis sian kotizon, supre de la aliĝilo aldonu sumon de F 100 por la aliĝo (F 75 por aliaj familianoj-enloĝantoj).**

Faru tuj vian devon!

## Grandskala Kampanjo en la kinejoj

En sia lasta kunsido de la jaro 1962, la administrantaro de B.E.F. decidis ke ni devos aliri novajn vojojn en nia propagando apud la granda publiko; kaj ĝi i.a. decidis iniciati pagitan reklamkampanjon en kinejoj en ambaŭ landpartoj.

Dum sia kunsido de la 2a de februaro, la estraro do decidis komenci tiuj kampanjon, ekde la 1a de marto, en kvar kinejoj: du en la flandra kaj du en la valona parto de la lando.

Tiu pagita reklamo daŭros, ĉiufoje, **dum unu plena monato**, tiel ke oni rajtos supozi ke ĉiuj enloĝantoj de la elektita komunumo estos vidintaj la reklamilon almenaŭ unu, kaj eble du aŭ tri fojojn!

La kvar unuaj kinejoj, en kiuj aperas do, nunmomente, dia-pozitivo speciale kunmetita tiucele kaj kiu atentigas pri la ebleco sekvi perkorespondan kurson, estas:

1. Gilly (Lauwe)
2. Seraing (Stuart)
3. Lier (Rubens)
4. Poperinge (Palace)

Ekde la 1a de aprilo, sekvos kvar aliaj komunumoj. La elektitaj kinejoj estos tiam:

1. Kortrijk (Filmuniversitato)
2. Hasselt (Eden)
3. Farcienne (Theatre)
4. Huy (Cameo)

**Tiu iniciato kostas kompreneble monon....** Ĝi povos esti daŭrigata nur se la monaj rimedoj de B.E.F. tion permesos. Kaj tio ja estos, se la sukceso de la unuaj reklamoj estus efektive tiaj, ke la mendoj de korespondaj kursoj estus tiel multnombraj, ke la profito el ili permesus **daŭre pagi la novajn projekciojn** en ĉiam novelektitaj kinejoj.

Ni kompreneble firme esperas ke tiel estos. Sed intertempe B.E.F. tamen danke akceptos donacojn, faritajn kun la speciala celo: la Kineja Kampanjo.

Se vi do per (mal)granda donaco volas helpi, vi povas ĝiri vian donacon al la P.Ĉ.K. de B.E.F. — Gento — N° 16.34.34, kun la speciale mencio: « **Kineja Kampanjo** ».



## KORESPODANONCOJ

NATARAV Joan, Caramidarilor 116

BAIA-MARE, Rumanujo

deziras korespondi por interŝanĝi poŝtmarkoj kaj insignojn

HELMUT GIEBEL, KATOWICE

ul. Katowicka 37 m 2

POLUJO

18-jara knabo, deziras korespondi kun knabino de 16 ĝis 18 jaroj



UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO

Sofio - Bulgarujo

3.8 - 11.8.1963

kotizoj

| Kategorio  | ĝis 31.3.63 | post 31.3.63 |
|--|-------------|--------------|
| Kongresano   | 644         | 728          |
| Edz(in)o   | 322         | 364          |
| Junul(in)o ĝis 20j.  | 406         | 462          |
| Studentoj(20j ĝis 30j.)  | 238         | 280          |
| Blindulo & gvidanto  | 322         | 364          |
| Individuaj membroj de Universala Esperanto asocio pagas la jenajn sumojn : |             |              |
| Kongresan(in)o   | 574         | 658          |
| Edz(in)o   | 287         | 329          |

Pagu al S-ino Plyson, Bruselo, P. K. 2368.04

KARAVANO AL LA SUNO

REIRVOJO:

Ni planis vojaĝon ĝis la 17.8.63, sed pristudante la aŭtovojojn kaj konsciante pri la belegaj aspektoj de la naturo kaj de la homaj efektivecoj en la tri landoj kien ni nun direktas la aŭtobuson, mi ne hezitis aldoni la dimanĉon al nia ok-taga ekskurso, tiel ke ni povis pli dispecigi la diversajn vojaĝpartojn: jen la rezultato:

(inter krampoj, de Rumanujo mi ĝis nun ne sukcesis aĉeti ie landkarton je konvena skalo aŭ detala gvidlibreto, el kio mi konkludas ke ni vizitos idealturistan landon, preskaŭ ne tuŝita)

**Sabato la 10.8.1963** : Sofio — Tirnovo (la belega aren-urbo) — Ruse Giurgiu (la Danubon ni retrovos tie) — Bukaresti

Tiel ni trairos la nordan parton de Bulgario, dum la kongreso mem ni povos nin direkti al la mezaj kaj sudaj partoj (400 km)

**Dimanĉo la 11.8.63** : Bedaŭrinde ni ne povas resti dum unu tago en tiu ĝarden-urbo, sed la ekskurso de tiu tago plene kontentigos ĉiujn: envere, ni norden de Bukaresto traveturos la petrolkampojn de Ploesti, la belegan valon de la Jahova, trapasante la karpatojn (Negoi: 2544 m), la urbojn Sinaia, Kronstadt (= Brasov = Orasul Stalin), la valon de la Olt, ĝis en Sibiu (Hermanstadt). (300 km) Matene eblis mallonga gvidata vizito al Bukaresto.

**Lundo la 12.8.63** : Granda etapo atendas nin, tra la malpli interesa parto de tiu nekonata lando, kiu kondukos nin ĝis en Cluj kaj Oradeo (Groszwardein), belaj urboj en la konata « Siebenbürgen ». Jam ni atingas la landlimon de Hungarujo, kaj ni transiras ĝin je la nura punkto kie tio estas ebla inter Rumanujo kaj Hungarujo, nome en Biharkeresztes. Ĉi-tie ni profitas unu horon, ĉar kiam estas 13-a en Rumanujo, ni envenas Hungarujon je tagmezo; ĝuste tial mi metis la plej longan vojarparton (550 km) nun, ĉar ni tamen alvenos ankoraŭ sufiĉe frue en Budapeŝto, post la travojaĝo de la famkonata « Pusta » kaj la Hortobagy.

**Mardo la 13.8.63** : mia priskribo estas mallonga: ni restas en tiu-ĉi belega urboj (Pest = la plej nova parto + Buda = la pli antikva) kaj tiuj kiuj ne ŝatas dum belega tago resti en var-

mega urbo, vizitos la lagon Balaton.

**Merkredo la 14.8.63** : Ni jes forlasas Hungarujon, laŭ la Danubvojo, kaj vizitante Raab (Győr), sed ne finos la belecoj kiuj estos prezentataj al ni, ĉar ni estas survoje al la Ora Urbo, Prago. Sed tiu urbo nur estas la kulmina punkto de dutaga vojaĝo en la tiel varia kaj belega ĉeha kaj slovakia lando. Vizitante Bratislava (Pressburg) kaj la faman kastelon de Lednice kun la plej bela parko de Europo, ni tranoktos en Brno (Brünn) (350 Km)

**Ĵaŭdo la 15.8.63** : al Prago, sed laŭ tre speciala vojo: norde de Brno ni vizitos la Macocha-rokojn, kaj sude de Prago ni foje trairos Telč kaj Tabor (250 Km)

**Vendredo la 16.8.63** : Prago, la Ora, aŭ la urbo kun la mil turoj kaj kupoloj, kie ni promenados sur la Karlo-ponto, Dro L. van Egge-raat skribis pri ĝi: tiun ponton kaj la cirkaŭaĵon mi neniam forgesos! Sed allogos nin ankaŭ la Mala Strana (malgranda urbo) kun la baroka centro, kaj la kastela kvartalo; sed mirigos nin ankoraŭ la Ora Strato kaj la S. Vitus-katedralo.

**Sabato la 17.8.63** : Ni forlasos Prago'n kaj la specialan atmosferon de post la kurteno en kiu ni vivis dum 14-tagoj, kaj tra Pilsen atingos la germanan landlimon (Waidhaus). Sed nia vojaĝo ne ankoraŭ finiĝos, ĉar atentos nin la bela urbo Nürnberg kaj la mirinda valo de la Pegnitz; ni restos por tranokti en Würzburg (380 km)

**Dimanĉo la 18.8.63** : Laŭ la valo de la Main ni atingos la aŭtovojon al Köln, kaj, el nia lando, kantos la adiaŭajnkantojn kaj halto post halto malplenigos la aŭtobuson.

Post la apero de la antaŭa numero de Sonorilo, denove kelkaj geanoj kaj eĉ eksterlandoj aliĝis, tiel ke mi povas por la momento publikigi la sekvantan liston: (laŭ la enskriboj):

Sinoj Plyson (Bruselo) F-ino Chris Lefevere (Bruĝo) F-ino J. Terry (Gento) Gesinjeroj Deboes (Gento) F-ino M. Mention kaj F-ino Chaineux (Verviers) F-ino Deketelaere (Blankenberge) Gesinjeroj Curnelle (Lambertart N. France) F-ino Kestens (Bruselo) F-ino A. Begodt (Merelbeke) F-ino A. enzlin (Berchem) Sro F. Roose (Bruĝo) Ges. kaj filino E.P. Ockey (Banstead, Anglujo). **Entute 18 kaj ankoraŭ 6 kandidatoj ne ankoraŭ antaŭpagis.** Mi certas ke post la apero de tiu-ĉi numero de Sonorilo nia aŭtobuso estos plena (29 lokoj kun rezervaj lokoj) kaj tio estas nun jam necesa, pro la fakto ke mi devas zorgi por la enirpermesoj por kvin landoj! **Mi jam demandas nun al ĉiuj kiuj ne disponas pri internacia pasporto valida: zorgu ke vi havu ĝin por ke mi povu doni pliajn instrukciojn per cirkuleroj ek de la fino de marto.**

Restas ankoraŭ du aferoj: la kostoj de la kroma tago (dimanĉo 18.8.1963) kaj la kostoj en Bulgarujo mem se ni volas disponi pri la aŭtobuso. Mia celo ne estas profitdona, ĝi nur celas sukcesigi nian ekskurson kaj do mi kaj la aŭtobuso klopodos esti je la servo de la gepartoprenantoj ankaŭ en Bulgarujo, se kompreneble tio ne endanĝerigos la tutan buĝeton; do lasu min promesi ke, se mi ne plu havas disponeblan monon de la vojaĝo mem, estas nun ankoraŭ tro frue por scii kun certeco la bilanciferojn, ni devos krompagi la verajn kostojn de la lasta tago (300 F?) kaj la kilometrajn kostojn por la aŭtobuso se ni uzas ĝin por eksterordinaraj ekskursoj en Bulgarujo mem. Tuj post la apero de la dua bulteno de la UK per kiu ni devos mendi la ekskursojn, mi sendos cirkuleron por sciigi kion ni per nia aŭtobuso povas fari. Same por la loĝado; se grupo de ni loĝus en sama hotelo, ni povus uzi la aŭtobuson por la veturado al akceptejo teatro, balo k.t.p. Ĉiuj mendoj de hoteloj k.t.p. okazu do pere de mi, por ke mi povu koncentrigi ĉion.

**Por eventualaj kandidatoj:** pagu 1000 BF al PĉK 2914.29 de Maertens G., Sint Kruis, Pr. Leopoldstraat, 51; se vi jam pagis la kongreskotizon, tiam 500 F sufiĉas. Ni certe ne plu akceptos kunvojaĝantojn post la fino de marto.

**Dum ke mi skribas ĉi-tiujn tekston, frostas ekstere pli ol 5 gradoj C; ho, ni sopiras al vi, Bulgario, lando de suno kaj rozoj.**



Mi nepre ne, patrinjo, digestadas,  
ke kurbas vi, sensuka, forlasita,  
samkiel pup' en kiu koro batas,  
en domo ĉe l'foriro forgesita.  
Makzelojn vidas mi tra viaj vangoj,  
okulojn fundpremitaj en la kapo.  
Kaj mutas emocie mia lango  
ĉe via diro: «ĉetablifĝu, knabo».  
Mi aŭdas vin demandi al la muroj  
vespere, ĉu vi fermis la fenestrojn.  
Ne elcerbigas plu al vi l'nebulito.  
Finkantis vi, nur ĝemas notorestojn.  
Jam malproksime oni fosas tombon;  
mi aŭdas pumekfali l'bulojn teren  
kaj post la domo vidas troiti ombbron:  
Il jam al ŝi ekfajfas verevere.  
— Sinjor', eniru, jen mia Patrino.  
— Ne timu nun ĉar liaj kruroj nudas;  
amiko estas, frato al fratino:  
Il paŝas pledfingre kaj ne krudas.  
Ĝis la revido en ĉi nokt' aŭ morgaŭ.  
Pregante Patro Nian vi prudentos.  
Rektigu l'kufon. Nu, per lia zorgo  
ne malvarmumos vi kaj ja kontentos.

## PATRINO

willem elsschot

(Antverpeno 1882-1969)

El la nederlanda: H. VERMUYTEN

### NI ORGANIZU EKSPOZICIOJN

Antaŭ pluraj jaroj kaj per testamenta donaco, Fino Henriette Toussaint, festestrino de «La Verda Stelo», postlasis sumon, al kiu ŝia fratino S-ino Lea Bernaerts aldonis plian sumon, kaj tiu «Fondaĵo Henriette Toussaint» iĝis la komenca kapitalo, per kiu la antverpena grupo aĉetis diversajn aparatojn, kiuj ebligas la agrabligon de la ĉiusemajnaj kunsidoj, kaj ankaŭ la kunmeton de Ekspozicia Materialo, kiu estis tiam komisiita al S-ro J. Montmirail kaj montrita, unufoje, ĉkaze de la jubileaj festoj de la Grupo, en 1957.

Evidentiĝis tamen post kelkaj jaroj, ke grava parto de tiu materialo devas esti «modernigita». Pri koloroj kaj gustoj oni ne diskutu, estas konata diraĵo... Tamen estas fakto, ke oni devas sekvi la guston de la publiko, kiam temas pri reklamiloj, kiuj ĉiunomente devas resti allogaj, altiraj por la okulo.

Jam de diversaj monatoj, S-roj J. Verstraeten kaj S-ro Fr. Schellekens dediĉas kune tri vesperojn de ĉiu semajno al la ellaborigo de nova materialo, kiu estas nun fakte finpreta... Kaj la Antverpena Esperanto-Intergrupa (E.K.I.) de Antverpeno iniciatis, — kun la helpo de tiu materialo, pruntedonita de «La Verda Stelo», — unuan publikan ekspozicion en la bela «Studio Cogels», parto de la malnova urbdomo de Deurne-apud-Antverpeno.

Dank'al la afableco de la komunumaj instancoj, tiu Ekspozicio povos okazi tie sabaton, la 23an (15a ĝis 19a horo) kaj dimanĉon, la 24an de marto proksima (9.30a ĝis 19a horo).

Inatigura ceremonio okazos sabate je la 15a horo kaj la organizantoj esperas ke ili povos tie saluti oficialan reprezentanton de la komunuma estraro.

Ĉiun horon, estos projekciata serio de diapozitivaj, kun klariga sonbendo. Ĉiuj la esperantistoj de la antverpena aglomeraĵo estas kore invititaj al la inaŭguro kaj al vizito de la Ekspozicio, kiu, — dum la tuj sekvantaj monatoj —, certe re-okazos en aliaj komunumoj.

Ni aldonu, ke tiu ĉi materialo estas je dispono de ĉiuj grupoj de B.E.F., je nur du kondiĉoj: unua estas la pago de la transportelspezoj... la dua estas la firma promeso, ke la materialo estos flegata kun la plej granda zorgo, kaj sub la respondeco de unu persono, kaj revenos en la sama bela stato, kiel ĝi estis je la forsendo!

# R E CENZ OJ

KAHILIL GIBRAN: «La Profeto». Tradukis el la Angla lingvo Roan Orloff Stone. Eldonis «Stafeto» en la serio de la «Beletraj Kajeroj» La Laguna 1962. 126 paĝoj. Prezo:

La Usona samideano(?) E. James Liebermann skribis la enkondukon per kiu ni konatiĝas kun la aŭtoro. Li naskiĝis en 1883 en Libanujo. Ankoraŭ tre tre juna li jam admiregis Leonardo da Vinci; kaj tiel ke pli malfrue li diris kaj enpraktigis: «Belecon kreu kaj lasu ĉion alian for al la infero». Frue lia familio elmigris al Ameriko. Poste li revenis al la Mez-Oriento. Li havis nur 15 jarojn kiam li verkis la unuajn provojn de tio kio fariĝis «La Profeto». Gi estis sekvata de aliaj verkoj kun socia-morala tendenco. En 1902 li iris al Parizo por studi poezion. Denove en Ameriko li tie klopodis revivigi la Araban literaturon. Li mortis en 1931, 48 jaraĝa. Tiu enkonduko estas tro mallonga. Estas bedaŭrinde ke J. Liebermann ne rakontis kial K. Gibran estis ekzilita el patrujo kaj eklezio. Tio prilumigus lian personecon. Ni ŝatus ankaŭ eksciĝi liajn konvinkojn pri amo; laŭ J. Liebermann, li ja forlasis karan belulinon «ĉar li ne volis submeti la idealan amon al la ritoj kaj leĝoj de homa geedziĝo» (p. 18).

Multaj homoj ne ŝatas poezion. Tio estas bedaŭrinda... por ili mem. Mankas al ili unu de la multaj belaĵoj kaj ĝojgiloj de la vivo.

Por ĝui tiun-ĉi libron oni devas ŝategi la poezion puran. Mi klarigas. Inter la poeziŝatantoj la plej multaj ŝatas ĝin aŭ pro la tendenco aŭ pro la senĉaplena enhavo de temo(j), en artbelaj formoj prezentita. Ne atendu tion en «La Profeto». Filozofiado ĝi ankaŭ ne estas. Gi estas poeziplena imagado de la laboro, de la manĝado kaj trinkado, de domoj, de leĝoj, de doloro, de vestoj, de amikeco kaj de plej diversaj temoj. Tamen per unu poezia ĵeto li iras ĉiufoje al la kerno de la afero. Kiam ekzemple li konkludas al esenca identeco de malĝojo kaj ĝojo (p. 50-51) ni ree troviĝas ne antaŭ racia klarigo sed jes profundanima sentado. La titolo praviĝas per tio kio origine, ĉe la Hebrea popolo, estis la profeto, nome ne profetisto de venontaj okazantaĵoj, sed «avertanto» kiu devas la popolon gvidi aŭ rekonduki sur la ĝusta vojo. Evidente ke ni retrovas en tiu libro la orientan multvortecon kaj la malsimplan prezentmanieron. Ekzemple, por diri ke la laboro estas bonefika beno por la homoj li diras sur paĝo 47: «Sed se en via doloro vi nomas naskiĝon malĝojo kaj la vivtenon de la korpo malbeno skribita sur vian frunton, tiam mi respondas, ke nenio krom la ŝvito de via frunto lavos for tion, kio estas skribita». Konfesu ke ĝi estas iom tordita, kvankam originala... kaj bela! Por doni ekzemplon kiel li tuj iras al la kerno de la afero, legu kion li skribas pri la pasio de la komforto, sur paĝo 54, i.a. la jenon: «Vere la avido por komforto mortigas la pasion de la animo, kaj poste marŝas rikanante en la enteriga ceremonio». Inter la plej legindaj «paroloj» estas laŭ mi tiu pri la instruaro (p. 78-79) kaj tiu pri la amikeco (p. 80-81). Mi citas ankoraŭ nur unu frazon: «Kaj kio estas labori kun amo? Gi estas teksti la ŝtofon per fadenoj tiritaj el via koro, kvazaŭ via amato devus porti tiun ŝtofon» (p. 48). Kelkloke li estas tiel grandioza ke en la sekvantaj liaj «paroloj» oni atendas nur la plejbonon... kaj foje oni estas tiam iomete seniluziigita. Tio al mi okazis kiam mi legis «pri la parolado» (p. 82). Mi eĉ devus tie kontraŭdiri la aŭtoron.

Multon oni devas legi, kompreneble. Sufiĉe ofte la poemo ŝajnas malklara; ankaŭ kompreneble. Tiu poemaro en prozo eĉos diversmaniere ĉe la diversaj personoj. Vi malkovros multon kion mi ne malkovris, kaj komprenos multon kion mi ne komprenis. Kiel mi mem, eble, komprenis fajna elementojn kiujn vi ne komprenos. Tio estas la sorto de tiaj poemoj kaj tia estas ilia efiko. Oni tro



facile parolas pri pliriĉigo de nia literaturo. Sed en tiu-ĉi kazo ni ne devas dubi ke ĝi efektive estas pliriĉigo de nia traduka literaturo. Tiu verko meritas la konatiĝon. Multe pli ! Laŭ mia sento ĝi estas plikulturigo de la personeco se oni legas ĝin.

Drs. F. ROOSE.

**ERNA.** Eldonita de I.K.U.E. Dordrecht. Frederikstraat 2; en 1962. — Rakonto por junaj naturamantaj infanoj — Originale en Esperanto verkita de S-ino Bep M. Slösser-Bresler. Prezo: 1,50 Ned.G.

Jen ni havas libreton, originale en Esperanto verkitan, kion oni cetere bone sentas dum la legado.

Entute ni povas substreki la antaŭvortojn de F-ino T. Durenkamp kie ŝi diras ke ĝi estos taŭga por komencantoj.

Preserarojn ni trovis malmultajn kaj ege malgrandajn.

Kelkajn kunmetitajn vortojn ni opinias pli malbonaj; ankaŭ la misuzo de kelkaj sufiksoj (tre malofte)

Dufoje ni ankaŭ konstatis la uzon de **kiel** anstataŭ **kia**.

Krom tio tre leginda libreto kiu ne demandas grandan streĉadon.

Ni povas rekomendi ĝin por legado en daŭriga kurso; tiam oni povas priparoli la lernitajn regulojn kun ekzemploj en la teksto.

**Preseraroj:**

p. 8 - kol. 1 - lin. 5: **arbedo** devas esti arbeto

p. 10 - kol. 2 - lin. 22: nesingardajo (sen aj)

p. 21 - kol. 1 - lin. 8 de sube: **sed** mi nur... (sen d)

p. 23 - kol. 2 - lin. 13 kaj 5 de sube: **kokirejo** — devas esti kokinejo

p. 27 - kol. 2 - lin. 4: **vojn** — devas esti vojon

p. 36 - kol. 2 - lin. 10: **etas** — devas esti estas

p. 38 - kol. 2 - lin. 7 de sube: **Certere** devas esti cetere

**Vortoj preferinde anstataŭataj:**

p. 7 - kol. 2 - lin. 23 kaj p. 31 - kol. 2 - lin. 21: **florfint**, pli bone forflori aŭ finflori

p. 11 - kol. 2 - lin. 7 de sube: **malbruo** anstataŭi per silento aŭ senbrua

p. 13 - kol. 1 - lin. 15: policano **regulis** la trafikon, pli bone reguligis

p. 22 - kol. 1 - lin. 1: **ilia hejmo** prefere la gepatra hejmo

p. 26 - kol. 2 - lin. 13 kaj 15: **rubusajoj** kaj **rubusaroj**, la unua devas esti rubusajo, la dua rubuso

p. 28 - kol. 1 - lin. 12 kaj kol. 2 - lin. 14: **kiel** belega birdo & **kiel** grandaj formikoj devas esti **kia** belega birdo kaj **kiaj** grandaj formikoj

p. 28 - kol. 1 - lin. 17: anstataŭ **finvenos** ni preferas fine venos

p. 28 - kol. 2 - lin. 19: **tremigaj**, pli bone estus timigaj

p. 31 - kol. 2 - lin. 18 de sube: **varmejo**, prefere varmdomo, eĉ vitravarmdomo

p. 35 - kol. 2 - lin. 21 de sube: **rigardis** el la fenestro, ne estas eble, devas esti rigardis tra la vitroj, ĉar la fenestroj estas fermitaj

p. 37 - kol. 1 - lin. 20: **tief** longan distancon devas esti tian longan distancon

p. 40 - kol. 2 - lin. 13 de sube: **okultrovi**, pli komprenema estus: ekvidi

Juliette TERRIJN.

#### KOREKTIGO DE TEKSTO.

En la recenzo pri la libro: « Les Langues Internationales » de P. Burney aperinta en « Sonorilo » 54a jaro; Nro. 7 Dec. 1962; la presisto forgesis kelkajn liniojn. La leganto bonvolu aldoni sur paĝo 11, post la dekdua linio, post la unua vorto « lingvo » la jenan tekston: ... prezentas la samajn malfacilaĵojn por absolute ĉiuj aliaj lingvoj. Pluraj jam faritaj provoj tamen pravas ke esperanto estas (eble la plej) taŭga lingvo por traduki. Rilate al la esprimado de sentoj, se la lingvo estas plenvolora lingvo,...

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (Sro Iserentant R.)

Blankenbergesteeweg 72 Brugge. P. K. 152140.

## Historio el

### Bruĝo

Ekzistas en la urba arkivejo de Bruĝo, en la fakoj de la magistrataj ordonoj de tiu ĉi urbo, du « Hallegheboden » aŭ komunumaj ordonoj, de la jaro 1542a, kiuj estas multsignifaj pri la senbrideco de la bruĝaj moroj dum la 16a jarcento.

Niaj libroj pri historio kaj niaj specialigitaj revuoj ne multe mencias pri tio.

En certaj medioj, oni preferas honteme ĵeti vualon sur la morojn de niaj prapatroj, kies forta religia konvinko, kion ajn kelkaj povas pretendi, bedaŭrinde nur malmulte malhelpis la senbridecon de iliaj moroj.

Ĉu tiam bezonas surpriziĝi ke, kiam antaŭ jaroj, la « Heroa Kermeso » estis projekciata sur niaj ekranoj, ne malmultaj el niaj samregnanoj, nesциante la tumultan historion kaj la malbonmorecon de la 16-a jarcento en Flandrujo, iris impetege protesti kontraŭ la projekciado de tiu filmo ?

Nu, kompare kun tiuj du ordonoj, datumitaj de la 18a de septembro 1542a, el kiuj unu koncernas la malĉastejojn kaj la alia la « pekon de adulto », la « Heroa Kermeso », kiu vekis tiom da pasio, sume nur estas palega kaj dolĉigita dekokto de tio, kio estis la historia realeco.

« La unua el tiuj ordonoj » asertas, en sukplena bruĝa dialekto, ke la magistrato eksciis pri sufiĉe multaj virinoj, » de malsaĝa kaj malbonmora » vivo, kiuj sin fordonis kaj ankoraŭ ĉiutage fordonas al kiu » ajn, kiu pri tio petas aŭ mon-



» tras emon kaj ke plie ili praktikas siajn malmoralajojn en ĉiuj lokoj kaj stratoj de la urbo, tiom en la plej gravaj, kiom en la plej respektindaj, tie ricevante kaj vivtenante aliajn virinojn de sama fikvalito.»

« Tigrade, pludiras la ordo no, ke, en tiu ĉi urbo ne ekzistas stratoj aŭ placoj, se ne tre malmultaj, kie, nun pli, nun malpli, ne troviĝas du aŭ tri diboĉejoj, kie virinoj malprudmoraj, je la granda skandalo de nia civito kaj je konfuziĝo de ĝiaj honorindaj civitanoj, ĉiutage estas la kaŭzo aŭ ĉe la origino de hontegindaj scenoj, kies nura vidado endanĝerigas la bonvirton de nia junularo.»

Tiu ĉi ordono ne forigas la diboĉejojn, tute ne. Ĝi ne haltigas la malvirton, sed nur ĝin limigas. Ĝi ordonrajte asignas al la diboĉejoj certajn kvartalojn de la urbo, kie ili de homa memoro estis tolerataj.

Estas dank' al tiu ordono ke ni kapablas lokigi la stratojn, kie niaj publikulinoj povis, sub tolerema rigardo de la aŭtoritatuloj, certigi sian vivgajnilon.



Jen tiuj stratoj: Ten Vla-minckdam, in de Clarastrate, proosche. La triunuay ankoraŭ ĉiam nomiĝas same. La Oost-proosche troviĝis en la ombro de la Sankta-Anna-preĝejo, kiu dum jarcentoj estis la plej mi-zera paroĥo de la urbo.

Tiu ordono instrukas, ke la publikulinoj kaj ilia sekvantaraĉo devos esti reenloĝintaj, antaŭ la festo de Ĉiuj Sanktuloj, la kvartalojn de tolero, je puno de tiena kondukado « je la sono de la tamburo kaj de la fifro ».

Se post la festo de Ĉiuj Sanktuloj, oni retrovas ilin en la domoj aŭ la lokoj el kiuj la ordo ilin elpelas, tiom la viroj, kiom la virinoj, estos ekzilitaj el Flandrujo, dum tri jaroj, la viroj je puno de pendigo, la virinoj je puno de enfosigo.

Ĉu devis esti ke la senbrideco de la moroj estis ampleksiĝinta dum tiu epoko, por ke la aŭtoritatuloj decidis pri dua ordono la saman tagon?

Ĝi koncernas la « pekon de adulto », pri kiu, tiel asertas la ordono, diversaj personoj, tiom viroj, kiom virinoj, estas publikfame akuzitaj.

Tiu ordono dekretas ke, kiu ajn estos estonte trovita en kunvivo kun alia virino ol la sia, aŭ kiu ajn virino kun alia ol sia laŭleĝa viro, estos ekzilita el Flandrolando je puno de la samaj sankcioj.

Sajnas ke tiuj ordonoj, malgraŭ siaj senkompataj sankcioj, ne estis laŭmezuraj por la diboĉaĵoj kiujn ili devis ĉesigi.

Tion pruvas la okazo de la monaĥinoj de Sarepta.

Kiam, sekve al la religiaj tumultoj, la monaĥinoj de Sarepta trovis dum la jaro 1566a rifu-

ĝejon en la Fluweelhof en Bruĝo, nuntempe la monaĥinejo de la Servistinoj de la Disinjoro, en la Annuntiatenstraat, ili estis dumnokte tiagrade ĝenitaj en siaj preĝoj, per la diboĉejoj kaj la ludofidomoj, kiuj abunde ĉirkaŭe, ke dum la jaro 1569a, la magistrato de Bruĝo, kiel lasta savilo kaj ne plu sciante kiun sanktulon alvoki, permesis ilian reiron al Moerkerke, je danĝero de ilia ĉasteco.

Tiutempa kronikisto, Johano Van de Vivere, raportas ke, dum la jaro 1531a, unu el la kvartaloj de Gento, « de groene briel », asignita al la diboĉulinoj, devis esti komplete evakuita sekve de la konstantaj amindumaĵoj de tiuj sinjorinoj, kiuj postkuris kun siaj ĉarmaĵoj la Aŭgustinajn monaĥojn, ilin turmentante dum iliaj laŭkanonaj preĝhoroj.

Ĉu fine necesas rememorigi ke la urbo Bruĝo posedis ek de la jaro 1461a, ĉe la ekstremaĵo de la Carmersstraat, tute proksime al la arkpafejo de Sta-Sebastiano, monaĥinan komunumon konatan sub la nomo de Pentintaj Filinoj aŭ Pentulinoj de Bethanie?

Tiu stranga komunumo enlasis en sia mezo nur senfortiĝintajn aŭ ellaciĝintajn publikulinojn. Ili tie venis, ŝirmataj kontraŭ la mondumo, sin dediĉi al la servo de la Bona Dio kaj sin prepari al la esperoj de la Valo de Jozafato.

La Bruĝa petolemo nomis tiun rifuĝejon Maegdendal aŭ Valo de la Virgulinoj.

André STRUBBE  
(kun permeso de l'aŭtoro tradukis: Ŝa Pu Pej)

## tombo kaj lulilo

### ĉe asŭano

La lasta deziro de la mortinta Aga Kan, ĉefo de la Ismaila sekto de islamanoj kaj unu el la plej riĉaj homoj de la mondo, estis, post morto ripozi sur la plej bela loko de la mondo. La homo kiu ĝuis la vivon en la plej luksaj somerumejoj de Francujo kaj Svislando, pensis pri Asŭano, urbeto en la sudo de Egiptujo.

Lia vidvino, fidela al lia deziro, konstruis al li maŭzoleon sur monteto apud Nilo, vidalvide de Asŭano, nur cent metrojn super vilao, en kiu la gedzoj dum ilia vivo ofte pasigis la tempon kune, en trankvila meditado, for de la urba bruego.

Tie nun staras maŭzoleo el blanka granito, sobra laŭ stilo kaj laŭ mezuroj, grandioza laŭ simpleco. De tiu loko la vizitanto superrigardas pejzaĝon, ne la plej belan laŭ mia persona gusto, sed sendube atmosferon kiu kaptas per forto la imagon de la rigardanto.

Sed hodiaŭ, se Asŭano estas nomo mondkonata, tio ne estas dank' al ies ajn tombo. Diskoniĝis tiun nomon kreaĵo kiu estos lulilo de Egiptujo de la estonto. lulilo de nova vivo por milionoj da homoj, por novaj industrioj, vivo por milionoj da novaj hektaroj de grundo. La granda nova digo, jam en plena konstruo, majstroverko de modernaj inĝenieroj kaj konstruistoj, pli grandioza ol ĉiuj piramidoj kune.

Sed inter tomboj kaj lulilo Asŭano havas multajn interesajn por scivolema rigardanto.

Abdula, brunhaŭta junulo gvidos nin per sia velboato ĉirkaŭ insulo sur Nilo. Lasu ni ke li streĉu la velon, kaj la venteto ŝveligu ĝin. Senbrue ni glitas nun sur la surfaco de la akvo. Senbrue ni plonĝas en la fundon de la historio.

Ni navigas tra kanalo inter la riverbordo kaj insulo. Sur ambaŭ flankoj elstaraj rokoj abrupte falas en la akvo. Super la rokoj restaĵoj de iama praa fortikaĵo. Kaj sur la roko mem estas videblaj bele ĉizitaj hieroglifaj skribaĵoj. Tie ĉi troviĝis fortikaĵo kiu gardis la limon de la Suda Reĝlando egipta, jam dum la unuaj dinastioj.

Apanaŭ ni pasas la impresajn naturajn muregojn, aliaj rokoj elstaras el la akvo. Pli kaj pli dense unu apud la alia. Nun ni ankoraŭ sukcesas navigi inter ili, sed dum malalta akvo tio estas neebla. Ni troviĝas en la Unua Kaskado de Nilo. Ĝi estas kaj ĉiam estis iuspeca limo de navigado sur ĉi tiu rivero. Tio estas la kialo, ke la antikvaj egiptoj konsideris tiun ĉi lokon preskaŭ la fino de la mondo. Pli suden de tiu ĉi punkto iradis nur ekspedicioj de bravuloj, kiuj ĉiam revenadis ŝarĝitaj per oro kaj eburo kaj aliaj valorajĵoj. Kaj ankaŭ nigraj sklavoĵoj, kiujn jam la faraonoj abunde uzadis.

Ni turnas nian velŝipeton, Abdula nin gvidas apud multaj strangaj nigraj rokoj sur la bordo de la insulo. Kelkaj havas formon de birdo aliaj de elefanto. Ili donis nomon al la insulo: Insulo Elefantina.



Ni alborde ĉe la orienta riverbordo. Ridanta nigra knabeto kaptas la ŝnuron de la boato, kiun Abdula ĵetas al li. Ni elŝipiĝas kaj vizitas la tombon de Aga Kan. En ĝia mezo delikate gravurita sarkofago el blanka marmoro. Apud ĝi surgenue sidas maljunulo preĝanta el sanktaj libroj islamaj.

De kie venas tiu belega blanka marmoro senmakula?

Sufiĉas eliri nur kelkajn paŝojn el la maŭzoleo, por vidi sur la alia flanko de Nilo kelkajn blankajn aŭ rozkolorajn makuojn sur la montdeklivo. Minejoj de granito kaj marmoro estas ili. Precipe famaj estas la ruĝa, griza kaj nigra granitoj de Asŭano, kiuj estas troveblaj en ĉiuj grandaj faraonaj konstruaĵoj de la antikva Egiptujo. Ankaŭ la romianoj disportis tiujn belajn konstruĵojn, ne nur al Romo, sed ĉien, kie ajn ili konstruadis, montranta al ilian grandan aprezon.

Ni vizitas ankaŭ la « ekzotikan ĝardenon » sur insulo, kies nomo estas: Kiĉener, laŭ la fama brita militisto, kies batalema nomo ĉi tie transformiĝis en ĝardenon, kie palmoj diversspecaj interplektiĝas por krei ĝuon al la vizitanto.

La lastan ekskurson ni rezervis al la alta digo.

Je ses kilometroj de la urbo troviĝas la unua digo, kiu jam kvindekajn jarojn plenumas gravan taskon. Sed la nova, kies konstruado jam komenciĝis, estos dekoble pli granda. La digo estos 111 metrojn alta, 3500 metrojn longa kaj unu kilometron dika en la bazo. Ĝi produktos jare dek miliardojn da kilovatoj de elektro.

La plej granda hidroelektra centralo de la mondo transformos Asŭanon el urbo de tomboj en urbon de lulilo de nova vivo.

Tibor SEKELJ.

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj — Speguloj —  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiakaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cemento por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
telefono 37.88.20

## STATUTO DE BELĜA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO

### Art. 1 — Nomo — Fondo

La 28-an de oktobro 1962-a, en Antverpeno, fondiĝis la « BELGA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO », kiu estas la landa sekcio de « TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO » (T.E.J.O.), laŭ la statuto de tiu-ĉi organizo, kiel ĝi aperis en la Jarlibro 1959 de U.E.A. La mallongigo de la nomo de la asocio estas B.E.J.A.

### Art. 2 — Celo

La asocio celes la disvastigon de Esperanto inter la belga junularo, kaj volas tiel kontribui al internacio interkompreniĝo kaj amikeco.

### Art. 3 — Neŭtraleco

La asocio estas neŭtrala rilate al politiko, religio, lingvo kaj raso. Ĝi rajtas kunlabori kun aliaj organizoj, kondiĉe ke tio ne kontraŭas ĝiajn neŭtralecajn principojn.

### Art. 4 — Lingvo

La oficiala lingvo estas Esperanto.

### Art. 5 — Sidejo

La sidejo de la asocio estas la loĝejo de la ĝenerala sekretario.

### Art. 6 — Membreco

Estas aŭtomate membroj de la asocio, ĉiuj en Belgio loĝantaj gejunuloj, havantaj malpli ol 25 jaroj, kiuj estas:

- a. — individuaj membroj de T.E.J.O.,
- b. — individuaj aŭ asociaj membroj de U.E.A.,
- c. — individuaj membroj de B.E.F.

Krome estas membroj de la asocio la gejunuloj, havantaj malpli ol 25 jaroj, kiuj senpere aliĝis al B.E.J.A.

Funkciuloj de la asocio kaj de ĝiaj sekcioj rajtas esti pli aĝaj.

La estraro rajtas nomi honorajn membrojn.

### Art. 7 — Kotizoj

Ĉiu membro pagas la kotizon, fiksitan de la estraro, laŭ la maniero, akceptita de la estraro.

### Art. 8 — Eksigo — Eksigo

La eksigo devas esti skribe deklarita al la ĝenerala sekretario.

Membroj kiuj, post averto, ne pagis la kotizon, estas konsiderataj kiel eksigintaj.

La estraro rajtas, post interkonsilo, eksigi membron, kiu kontraŭlaboras la celojn de la organizo.

### Art. 9 — Lokaj sekcioj

Lokaj sekcioj povas esti fondataj, kondiĉe ke ili konsistu el almenaŭ 5 membroj. La asocio stimulas laŭeble fondon de tiaj sekcioj.

Pli ol unu sekcio en la sama komunumo povas esti fondata nur post interkonsiliĝo kun la jam ekzistanta(j) sekcio(j); kaj post permeso de la estraro de B.E.J.A.

### Art. 10 — Estraro

La estraro konsistas el:

- unu prezidanto,
- unu vic-prezidanto por la flandra landparto,
- unu vic-prezidanto por la valona landparto,
- unu ĝenerala sekretario,
- unu sekretario por la flandra landparto,
- unu sekretario por la valona landparto,
- unu kasisto.

La estraro estas elektata ĉiun jaron per sekreta voĉdono de la membroj, dum la oficiala jarkunveno de B.E.J.A.



# G. FAES

Eiermarkt, 21  
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO  
RADIO kaj GRAMOFONO

LES ENTREPRISES

# DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO  
Tel.: 15.19.92

Entrepreno de  
KONSTRUAĴOJ

La estraro direktas la asocion laŭ la statutoj de T.E.J.O. kaj de B.E.J.A. En kazo de neinterkonsento de la estraranoj pri iu punkto, ili decidas per simpla plimulto de voĉoj.

#### Art. 11 — Komitato

La estraro nomas nedefinitan nombron da komitatanoj, kiuj okupas sin pri specifikaĵoj. Ili rajtas ĉeesti la estrarkunvenojn, kaj tie havas konsilan voĉon.

#### Art. 12 — Kunveno

Okazas oficiala ĝenerala jarkunveno de B.E.J.A. unufoje ĉiun jaron. La estraro kunvenas minimume unufoje ĉiun jaron.

Laŭ peto de almenaŭ tri estraranoj, la prezidanto organizas pliajn estrarkunvenojn. Estrarano kiu ne povas partopreni estrarkunvenon, rajtas — per skribita atestilo — anstataŭi sin de alia membro, kiu funkcias plenrajte kiel estrarano dum la koncerna kunveno.

#### Art. 13 — Ĝenerala voĉdono

Ĝenerala voĉdono okazas:

- ĉiun jaron, por elekti novan estraron, dum la oficiala jarkunveno,
- pri iu problemo, se la estraro tion decidas,
- pri iu problemo, se almenaŭ 20 membroj skribe petas tion al la ĝenerala sekretario, minimume unu monaton antaŭe.

Principe la ĝenerala voĉdono okazas dum la oficiala jarkunveno. En urĝaj okazoj ĝi povas okazi skribe. Tiam la lokaj sekcioj kunigas la voĉojn de siaj membroj, kaj sendas la raporton de la rezulto al la ĝenerala sekretario de B.E.J.A.

#### Art. 14 — Financoj

La enspezoj de la asocio estas:

- membrokotizoj,
- monprofito de aktiveco de la asocio,
- mondonacoj kaj subvencioj.

La kasenhavo povas utili nur al la aktivecoj de la asocio.

Ĉiun jaron la kasisto reviziigas la kason de iu estrarano aŭ komitatano, kaj dum la oficiala jarkunveno prezentas raporton pri la kassituacio.


#### Art. 15 — Statutŝanĝo

Statutŝanĝo povas esti petata de minimume 4 estraranoj aŭ 20 membroj. Pri la ŝanĝo decidis nur la ĝenerala jarkunveno, per plimulto de almenaŭ 2/3-oj de la voĉoj.


#### Art. 16 — Dissolvo

En okazo de dissolvo de la asocio, la restanta havaĵo restas je dispono de nova fondita asocio. Se nova asocio ne fondiĝis dum intertempo de tri jaroj, ĝi estos donacata al alia Esperanto-organizo, kiun indikos la decido pri dissolvo. Agnoskita dum la estrarkunveno de 16.XII.1962.

SONORILO, numero de marto, aperos meze de la monato; ni akceptas tekstojn ĝis la 5.3.1963.



### KRUCVORTENIGMO N° 3



#### DIFINOJ:

##### Horizontale:

1. ĉiu esperantisto estas...
2. kora sento - minerala farbo.
3. la tuto de ĉio.
4. nenia kvanto da — unua parto de la nomo de sudamerika ĉefurbo.
5. prepar' nutraĵon.
6. karesa nom'
7. iel ronda korpo.
8. okupo aŭ profesio — du sinsekvaj literoj.
9. frakci' — alfabeto.
10. metas je la dispono.

##### Vertikale:

1. maldivideco.
2. bonfarte — infekta malsano.
3. virin' kiu meritas difinon H.2
4. translokigi ion — mallongigo de universitata grado.
5. ruĝa kolorigilo uzata en fotografio.
6. senaktivec' — du konsonantoj de vorto kun signifo: ligilo-membr'.
7. estinta — dirata de anĝelo aŭ de ĉarma infano.
8. speco de nutra fekulo tirita el radikoj de kelkaj tropikaj plantoj — verba finaĵo.
9. nomo de litero — dufoje la sama vokalo — du sinsekvaj literoj.
10. kapablon venki kontraŭstaron.

N.B. 1) La vortoj ĉe la kvar lateroj (randoj) formas devizon.

2) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difi-



no, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.

- 3) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
- 4) Sendu nepre vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

### Solvintoj de la problemo N° 1

Diversaj solvoj estis ensendataj. Kvar legantoj ensendis senaran solvon : S-ro. R. Iserentant, Bruĝo ; S-ino. Maria Volders, Antverpeno ; S-ro. A. Laurent, Bruselo kaj S-ro. M. Lemme, Lieĝo. Lotumado aljuĝis la libropremion al S-ro. A. Laurent.

### Solvo de la problemo N°2

LA - PER - DAT  
EGAL - ITALO  
R - BELGA - EG  
N - - N - L - AGO  
ESPERANTO -  
JO - - E - E - RI  
- FEDERACIO  
BOVINETE - N  
E - AL - VENKO  
NU - B I O - D O -

Inter la diversaj ensendaĵoj, nur tri senaraj de: S-ro. A. Vande Velde, Gento; S-ro. R. Iserentant, Bruĝo, kaj S-ino. S. Verbeke, Bruĝo. Lotumado aljuĝis la libropremion al S-ro. A. Vande Velde. La entenata devizo estas : « Per Belga Esperanto-Federacio al venko ».

### JAM ESTAS PRETAJ LA ESPERANTO-AFISOJ PRI LA SPECIMENA FOIRO DE BARCELONA 1963.

Tio okazas jam por la kvara jaro. Esperantistoj bonvolu montri sian dankemon per amasa petado. Kiel kutime oni eldonis tiun belegan kaj modernan afiŝon en du formatoj, 70 x 100 cm., kaj 30 x 40 cm. (belegaj por ekspozicio de esperantistoj !), KAJ SENPAGE RICEVEBLAJ.

Interesitoj bonvolu skribi, se eble sur papero de komerca, industria aŭ turisma entrepreno al:

31a Oficiala kaj Internacia Specimenfoiro  
Propaganda Fakoj — Paseo de Maria Cristina s/n.  
BARCELONA-4 (Hispanujo).  
La foiro okazos en junio 1963.

HET WELGEKEMDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



# in't duifken

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDIJNEN - LODENS  
STIJLVOL MAATWERK



KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

## NOTOJ PRI LATINA LINGVO

1-e: Serioza:

El « Osservatore Romano » de 6.1.63: Lia Papa Moŝto: Johano la XXIII-a, alvokante al la dua kunsida periodo de la Koncilio kaj parolante pri la uzo de la vulgaraĵoj (= naciaj) lingvoj en certaj publikaj preĝoj de la Eklezio, deklaras ke tiu uzo ne eblas, almenaŭ ne en la nuna momento.

Tio estas nova konfirmo pri la ĉefeco de la latina lingvo, kiu restas unu el la elementoj por la konservado de la universaleco de la Roma Eklezio.

Multaj misistaj episkopoj postulis la uzon de siaj enlandaj lingvoj por la religiaj ceremonioj. Sed tiuj lingvoj estas tro primitivaj kaj tro multenombraj. Aliflanke koncerne la tutevoluintajn lingvojn, tiuj detruus la eksteran kaj formalan unuecon, kiu estas tiel multvalora.

2-e: Iom malpli serioza:

Kardinalo Antonio Bacchi verkis vortaron pri modernaj vortoj malfacile tradukeblaj en latinan lingvon. Li persone prezentis ĝian kvaran kaj lastan eldonon al Lia Papa Moŝto Johano la XXIII-a.

Kelkaj tradukoj reflektas la personan opinion de Kardinalo Bacchi, tiel ekzemple: ĝazmuziko estas tradukita per « Absurda symphonia », « Absurdi cantus » aŭ « Absurdi soni » kaj la « rock'n roll » per « Barabara saltatio » (barbara saltetado).

Post la rokenrolo, ni konis ankaŭ la tūiston, la madisonon, la bosancvon kaj la serio daŭriĝas. Ni emus scii la latinajn tradukojn de tiuj lastaj dancanoj. Ĉiokaze, ni povus proponi por unu: « barbarissima saltatio », sed por la aliaj ni « perdis nian latinan » !

Kompilis SA PU PEJ

### Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S. P. R. L.


Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj ; KATOKULO, por signalvitroj.



Kial vi ĉiam eklegas „Heroldo” antaŭ la tagmanĝo. Ni jam atendas vin dum duona horo



- Bonvolu rideti samideano !  
- Kial ?



# GRUPA VIVADO

## ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »  
Poŝtĉeknumero: 726.54

Pro forfalo de kelkaj paragrafoj la rubriko de « La Verda Stelo » ne entute aperis en la antaŭa numero. Jen en kelkaj linioj la parto mankanta:

Fino de aŭgusto S-ino Ada Fighiera, direktorino de « Heroldo de Esperanto » raportis pri la 47a UEK en Kopenhago.

S-ro Maur. Jaumotte enkondukis la vintran sezonon per parolado pri « Vojaĝo en 10 landoj de Mez-Eŭropo / Rigardo malantaŭ la Fera Kurteno », parolado kiu estis daŭrigata, la 21an de septembro.

Dimanĉon, la 9an de septembro aŭtoĉarekursuro en Orient-Flandrio gvidata de S-ro R. Van Eynde bonege sukcesis kaj por nova elementa kurso lundo, la 10an enskribiĝis 16 gelernantoj. Profesoro estas S-ro H. De Roover.

La 14an S-ro Jan Jacobs prezentis pri Finnlando kaj la 28an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentfilmojn — unu en Esperanto.

La 5an de oktobro en la rubriko « Ĉirkaŭ la Fajro » kunlaboris: S-ro E. Claes, S-ro Ivo Durwael kaj S-ro H. De Roover kiu lerte gvidis debaton pri « Ĉu ni devas diri la veron al niaj infanoj pri ilia naskiĝo ».

La 16an de novembro denove oni havis la plezuron aŭdi S-ron Eug. Paesmans dum parolado pri sia 8-taga restado en Romo. Li montris multajn bildojn kaj F-ino A. Enzlin prezentis belkoloran memverkitan filmon pri la eterna urbo kiun ŝi vizitis dum la Universala Kongreso de IKUE.

La 23an, kiel ĉiam antaŭe, la dokumenta filmvespero de S-ro R. Van Eynde akiris grandan sukceson. Unu filmo en Esperanto « Nuboj, Digoj kaj Malproksimaĵoj » pri traktante la vivon de la polderaj vilaĝoj norden de Antverpeno, precipe estis ŝatata.

La 30an la junĝa sekcio de la grupo: la J(unulara) A(ntverpena) S(ekcio) — JAS — prezentis kabaretan vesperon. Ĝi estis tute sukcesplena kaj malgraŭ la kelkaj malgrandaj neperfektaĵoj la tuto ege plaĉis al la vidantaro kiu per vigla aplaŭdo post ĉiu programero manifestis sian kontentecon. S-ro I. Durwael, kiel nelacigebla reĝisoro meritas ĉian laŭdon, same kiel liaj fervoraj ge-

kunlaborantoj: F-inoj Els De Roover, Gloria Leibovitch, Helga Janssens, Ingrid Maes, Milly Van den Bergh kaj la S-roj Guido De Raedt, François Schellekens, Marc Van Brabant kaj Roger Van Humbeeck. Konkludo: oni jam kalkulas je sekvonta kabareta vespero post kelkaj monatoj.

La 7an de decembro evoluis en sfero de Sankta Nikolao. S-ro H. De Roover laŭ tre ŝercema maniero rakontis pri junagaj okazintaĵoj el sia propra vivo dum la periodo de la granda Sanktulo: S-ro E. Claes, tre emociplene kaj ĉiam pli kaj pli bone prelegante, enkondukis la aŭdantojn en iom dramatan atmosferon kiu, feliĉe, havis bonan finon; F-ino Math. Hofkens kreis tre amuzan sferon per spritaj okazintaĵoj el sia juna vivo; S-ro Luc De Marré prelegis el Belga Antologio kaj F-ino Bl. Geers, helpata je iu momento de la Prez. S-ro Maur. Jaumotte, daŭrigis la prelegon el la libro (de ŝi tradukita en Esperanto) « La Birdoj de l'Paradizo » de Gaston Martens.

La 14an en la kadro de EKI la Zamenhofa Vespero iĝis vera sukceso: plena salono, taŭga programo kaj samideana atmosfero. Filmo pri la UEK de Kopenhago kaj la Junulara Kongreso en Ystad estis prezentata kun komentario « Kviso » inter la grupoj « La rekta vojo » kaj « La Verda Stelo » montrigis tre vigla kaj amuza kaj instruiga samtempe. La Rekta Vojo brile gajnis la konkurson. Kiel Intermezo la tombolo alportis sufiĉe gravan sumon al la kasisto kaj por konkludi S-ro Maur. Jaumotte prezentis lumbildojn pri la vivo de Dro Zamenhof kaj li lerte ilin komentis.

**Programo de la venontaj kunsidoj:**  
Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw », Frankrijklei, 4 je la 20,15 h (la etaĝo).  
MARTO:

La 1an: Parolata Jurnalao; la 8an: Parolado de S-ro K. De Cock, pri « Naturo »; la 15an: Parolado de S-ro J. Verstraelen pri « Een Mens van Goede Wil » (Bonvolemlulo) de G. Walschap; la 22an: Ĉirkaŭ la Fajro (ebleco por ĉiuj membroj partopreni per kontribuajo); la 29an: KABAREDA VESPERO de la junulara sekcio J.A.S.

### Familia Vivo:

Geedziĝis la 22an de decembro nia

fidela membro kaj kunlaboranto S-ro Wim De Smedt kun F-ino H. Kricemans. Al la juna paro, al la familio kaj parencoj niajn korajn kaj sincerajn gratulojn.

En la familio C. Tytgat-De Ketelaere naskiĝis fileto « Jan ». Patrino kaj infano bone fartas! Korajn gratulojn al niaj karaj gemembroj kaj la aliaj familianoj.

En alia familio (parenca al la unua) de Doktoro W. Peeters-De Ketelaere naskiĝis filineto « Leentje ». Samajn gratulojn kaj bondezirojn al la feliĉaj gepatroj kaj familianoj. Ankaŭ la patrino kaj naskiĝintino troviĝas en bona sanstato!!

### Ekspozicio:

Vidu paĝ. 10

### BRUGO

Bruga Grupo Esperantista, Reĝa Societo (Poŝtĉekkonto N° 4835.33)

Dum oktobro kaj novembro daŭris ĉiumarde la lecionoj de la elementa kurso sub gvidado de S-ro. Eneman, kaj la ordinaraj kunvenoj.

La 16an de oktobro F-ino. Y. Poupeye prezentis unuan parton de sia parolado « Tra Eŭropo per kolordia pozitivoj ».

Krucvortnigmo, prezentita de S-ro. Ch. Poupeye, estis kune solvata dum la kunveno de la 23a.

S-ro. Eneman, post sia kutima leciono, donis la 30an de oktobro, paroladon kun kolordia pozitivoj, sub titolo: Rememoroj el Heidelberg kaj la 6an de novembro, li interese paroladis pri « Antikvaj kuraciloj ».

Lerniga portretludado agrabligis la kunvenon de la 13a de novembro, kaj konkursludado pri creraj desegnaĵoj, tiun de la 20a.

La 27an, F-inoj Is. Van Parys kaj Y. Poupeye paroladis laŭvice pri sia koma vojaĝo al Sicilio, kun projekcio de belegaj kolordia pozitivoj.

Plie dimanĉon 4an de novembro delegatitaton kaj ek de 1946a ŝi fariĝis vicprezidantino, kiun postenon ŝi konservis ĝis pasinta jaro, kiam funebro kaj malsano malhelpis al ŝi plian aktivan kunlaboradon. Ŝi estis tiam nomata honora vicprezidantino.

Bruga Grupo Esperantista perdis en ŝi amindan kaj plej fidelan kunlaborantinon. Multaj grupanoj ĉeestis la funebran ceremonion.

Al ŝiaj familianoj ni esprimas korajn kondolencojn.

gacio de la grupo ĉeestis la jubileajn festojn de la grupo « Paco kaj Justeco ».

La 4an de decembro okazis la Sankta-Nikolao-festo, dum kiu nekonataj premioj, alportitaj de ĉiuj ĉeestantoj, estis elotataj inter ili kaj elvolvigataj el multaj paperoj kaj skatoloj, je granda plezuro aŭ surprizo de la gemembroj.

Post la leciono de la 11a, la prezidanto, S-ro. Ch. Poupeye, rememorigis pri la vivo kaj la verko de Dro. Zamenhof.

Lasta marda kunveno de la 18a kaj escepte jaŭda de la 27a estis dediĉataj al diversaj aranĝoj kaj plie al lernigaj ludoj, kaj la grupanoj kunvenis lastfoje sabaton 29an, por iri per diversaj aŭtomobiloj, tra la bele ennegita regiono de Uilenspiegel, al nova kampara restoracio en Oostkerke, kie ili ĝuis plej agrablan finjaran vespermanĝon.

La nova jaro komenciĝis por la grupo, mardon 8an de januaro, kiam en agrabla ĉeesto la gemembroj dividis inter si belan kukajon bakitan kaj proponitan de S-ino. Ch. Poupeye. La enbakita fabo aljuĝis la titolon de reĝino an F-ino. Is. Van Parys, kiu tiam elektis kiel reĝon S-ron. Ch. Poupeye, kaj sub ilia bonhumora regado forpasis la fino de la vespero en amuza atmosfero.

La vintra vetero iom malfavoris la ĉeestadon de la kunvenoj de la 15a, 22a kaj 29a de januaro, tiel ke diversaj antaŭviditaj programeroj devis esti prokrastataj. Dum tiuj kunvenoj la ĉeestantoj sin okupis per lernigaj ludoj.

La kunveno de la 5a de februaro estis dediĉata, post la leciono, al pedagogia debato: « Globala aŭ analiza metodo ». En ĝi partoprenis ĉefe S-ro. J. Eneman, instruisto kaj S-ino. S. Verbeke, eksinstruistino.

### Programo por la venontaj kunsidoj

MARTO: 5-an: « Du tagojn en Romo » parolado kun koloraj diapositivoj; F-inoj. Is. Van Parys kaj Y. Poupeye.

12-an: « Tra Burgondujo », parolado de S-ino. S. Verbeke.

19-an: Amuza proceso, S-ro. Ch. Poupeye.

26-an: Impresoj pri Luksemburgo. F-inoj. Yol. kaj Chr. Van Parys.

APRILIO: 2-an: Parolata gazeto.

### Nekrologo

La 2an de januaro 1963a mortis en Bruĝo, F-ino Alice BOEREBOOM. Ŝi membriĝis al la Bruĝa Grupo Esperantista dum oktobro 1919a, en la unua kurso de la karmemora S-ro. S. Deriaux. Jam en 1924a, ŝi eniris la grupan



## FAMILIA KRONIKO

**GRATULOJ** al F-ino. Isabelle VAN PARYS, sekretariino de BGE, kiu, laŭ ministra dekreto 30.10.62, estis delegita kiel juĝoregistrino ĉe la Polica Tribunalo de Bruĝo.

### Paco kaj Justeco

Pri la programo de la monato de decembro ni citas la inviton ĉe gesinjoroj Iserentant (13.12.62), la priparoladonde la verko Eterna Bukedo de K. Kalocsay gvidita per la Prezidanta kompetenteco (20.12.62) kaj la klarigojn de G. Maertens pri la nova humanismo aŭ kosmismo (27.12.62).

Nia grupa vivo kulminis en nia ĉiujara Kristnaska Festeno, kiu okazis ĉi-jare la 5.1.63, kun tre bona bankedo, parolado de nia Prezidanto, kaj la ĉiujara revuo prezentita de Fesdirektoro Dumarey (kiu ankaŭ verkis la tekston) kaj vicprezidanto Maertens G.

La 17.1.63 okazis la ĝenerala jarkunveno: post la prezentadoj de la raportoj, la nova estraro estis elektata: estraranoj por la jaro 1963 estas: Roose F., Iserentant R., Maertens G., Martens R., van Wezel Ada, Dumarey A., Hinderickx C., Dekersgieter Henriette, Dekoninck S. kaj Danneels L.

La Gramatikaj ekzercoj de la monato sub gvidado de R. Martens okazis la 24.1.63, dum ke la kunveno de la 31.1.63 estis prokrastita.

### Karlorega Grupo Esperantista Reĝa Societo

66, Strato Vandervelde, MARCHIENNE

OKTOBRO: La 9a: Kutima kunveno - Semajnfino de la 13a kaj 14a

Ni ĝoje akceptis samideanojn el Verviers en nia urbdoma loko. Ni babilis kaj poste, Sro Paulus paroladis pri la morgaŭa vizito, de la grava abatejo de Aulne. Ni ankaŭ vidis hungaran filmon kaj kelkajn folklorajn diapozitivojn.

Post komuna vespermanĝo (bonaj mituloj kaj fritoj) ni veturis ĝis la Kastejo de Monceau-s/Sambre; kie oni prezentis al ni belan filmon pri la « Nigra Regiono », kiu montris la belajn lokojn en la ĉirkaŭaĵoj de Karlorego.

Dimanĉe mateno, post la gvidata vizito de la Urbdomo (kun ĝia 94 m. alta turo) kaj de la palaco de la Belaj Artoj, ni veturis por tagmanĝi ĉe la rando de bela arbaro. Ni piede promenadis tra la aŭtuna naturo ĝis la Abatejo de Aulne, kies gravajn ruinaĵojn ni vizitis sub la gvidado de Sro Paulus.

Tian renkonton ni ŝatis multe kaj ni

opinias ke kelkaj Verviersanoj ankaŭ ŝatis ĝin, ĉar ili venis 2 foje...

La 23a — Sro Delforge iniciatis vicon de prelegoj pri matematiko. La unua rememorigis al ni niajn junajn jarojn sur la lernejaj benkoj!

NOVEMBRO — La 6a — 2a prelego de Sro Delforge pri matematiko.

La 20a — Kutima kunveno — Diversaj anoncoj.

DECEMBRO — La 4a — 3a prelego de Sro Delforge pri matematiko. Ni certe fariĝos bonaj ĝelernantoj fine!

La 15a — La jara bankedo komenciĝis sub nigraj aŭspicoj ĉar ni estis 13! Favore malfruigintoj permesis al ni ĝojigi, tiel ke ĉiuj daŭrigis la feston dancante ĝis la 3a matene.

La 18a — Aŭdado per magnetofono de la « Turo de Babelo », teatraĵo ludata de la Antverpena Grupo.

JANUARO — La 8a — Fino Orsolini prezentis 126 diapozitivojn pri Korslando kaj komentis sian novembran vojaĝon en tiu bela insulo.

### Lovena Grupo L.E.A. Naamse straat 78

Programo de junio ĝis decembro 1962. Julien De Keukeleire: Speleologio. Belaj kolordiapozitivoj pri diversaj grotoj.

Wim De Smet: Beneluksa kongreso Den Haag kaj Universala Kongreso Kopenhagen.

F-ino Henquinez: Mia vojaĝo al Romo kun 5 ĝelernantoj, je invito de la Intern. Unuiĝo de Popoluniversitatoj.

Wim De Smet: Mia vojaĝo al Skotlando kaj la Skota grupo de esperantopoezoj.

Wim De Smet: Mia restado en Stokholm kun bildoj.

Marcel Cockx: « Mia vojaĝo al Rusujo tra Pollando » kun belaj kolordiapozitivoj pri Varsovio, Moskovo, Leningrado.

Filmo: Gentse Floralien kun teksto Ea sur sonbendo de S-ano Schellekens. Zamenhof festo kaj Eo jubileo argenta de S-ino Meurrens.

Lumbilda parolado de S-ino Meurrens pri B-Kongo-arto. Poste vizito al privata kolektajo.

Parolado de Frato Arni De Corte kun diapozitivoj pri Patro Pio de Pietralcina kaj pri la psikiatra Instituto, Korbeek-Lo.

Kurso kun 20 gestudentoj startis.

Kunvenejo: Naamse str. 78  
Leuven

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI  
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI  
AĈETAS ĈE

## STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559  
detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ  
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA  
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo: ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.



manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ  
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

- |            |                         |
|------------|-------------------------|
| Antwerpen  | : Aalmoezenierstr. 2    |
|            | Abdijstr. 57            |
|            | Anselmostr. 17          |
|            | Nationalestr. 87        |
| Arlon      | : Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge     | : Breidelstr. 8         |
| Brussel    | : Galerie d'Ixelles 9   |
|            | Anspachlaan 19A         |
| Eupen      | : Kirchstr. 14          |
| Gent       | : Brabantdam 25         |
| Herstal    | : Rue Large Vote 4      |
| Leuven     | : Bondgenotenlaan 29    |
| Luxembourg | : Place de la Gare 67   |
| Mechelen   | : Grootbrug 8           |
| Roeselare  | : Ooststr. 124          |
| Tournai    | : Rue Royale 75         |
| Turnhout   | : Herentalsstr. 6       |
| Verviers   | : Pont St. Laurent 2    |